# BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA numero 1 marto 1975

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA SUR PACA VOJO . . .

La 16-an de decembro 1974 ĉeestis 55 membroj kaj 10 gastoj solenan vesperon okaze de la 115-a naskiĝdatreveno de L.L.Zamenhof kaj okaze de la finiĝo de la "Jubilea jaro de la Pacmovado".

La programo, aranĝita en kunlaboro de la MEM-sekcio de nia Asocio estis honorita per la ĉeesto de Jiří Wolt, vicprezidanto de la Regiona Packonsilantaro (Praha). ĈEA reprezentiĝis per la prezidanto Vítek kaj sekretario Křimský.

La ĉefan punkton de la programo prezentis O. Kníchal, MEM-sekciestro de ĈEA, per prelego pri L.L.Zamenhof. Venis ankaŭ raportisto de la Ĉs.presagentejo, kiu poste disvastigis informon pri la akceptita rezolucio helpo al ĉiliaj patriotoj. Krom tiu ĉi rezolucio oni ankaŭ ĉiuvoĉe akceptis la proponon pri letero adresita al la prezidento de Ĉeĥa Packonsilantaro kaj plue la proteston de ĉeĥoslovakaj esperantistinoj kontraŭ la arestado de ĉiliaj virinoj, prezentitan de Milada Josková, membrino de Internacia Komitato de Esperantistaj Virinoj.

red.

"Dr-o L.L.Zamenhof – la pioniro de internacia komprenigo kaj kunlaboro
(ankoraŭ pri la programo de solena vespero en EKP)

En nia kunvenejo, bele ornamita, okazis la 16-an de decembro 1974 solena vespero honore al la 115-a naskiĝdatreveno de D-ro L. L. Zamenhof kaj okaze de la finiĝo de Jubilea jaro de Pacmovado, aranĝita en kunlaboro de la MEM-sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La vicprezidanto J. Mařík bonvensalutis la ĉeestantojn, precipe la gastojn: reprezentanton de la Pacmovado Jiří Wolt, vicprezidanton de Regiona Packonsilantaro, Josef Vítek, prezidanton de ĈEA kaj Z. Křimský, ĝian sekretarion kaj ankaŭ k-don J. Borovička, raportiston de la Ĉs. presagentejo (ČTK).

La programo estis komencita per deklamo de "Jam kreskas la semo", poemo de Kolomano Kalocsay, prezentita de la vieprezidanto D-ro M. Nývlt.

Miroslava Juřenová, instruistino, gvidis poste sian infanan grupon, kiu ĉarme prezentis la scenon "Paca stafeto", duone en la ĉeĥa, duone en flua Esperanto.

D-ro Pravoslav Sádlo-Páv kun sia lernanto plezurigis nin per violonaĉela koncerto.

La ĉefan parton de la programo realigis O.Kníchal, prezidanto de la MEM-sekcio de ĈEA kaj membro de la Ĉeĥa Packonsilantaro, per prelego pri L.L.Zamenhof kiel pioniro de la paca kunlaboro kaj interkompreniĝo. La parolanto menciis ankaŭ la dudekjaran datrevenon de la rezolucio de UNESCO, en kiu tiu ĉi supera organizaĵo rekonis la valoron de Esperanto por la edukado, scienco kaj kulturo.

Laŭtaj aplaŭdoj montris, ke la programeroj vere plaĉis al la ĉeestantoj.

Láďa Kynčl, kiu kondukis la programon, poste transdonis la parolon al Dr-o Nývlt, kiu laŭtlegis proponon pri letero al la estraro de Ĉeĥa Packonsilantaro kaj proponon pri rezolucio por subteno al la patriotoj en Ĉilio. Membrino de la Internacia Komitato de Esperantistaj Virinoj- Milada Josková – poste legis al ni proponon pri rezolucio kontraŭ la arestado de virinoj en Ĉilio. La letero kaj rezolucioj estis unuanime aprobitaj.

Ni travivis tre sukcesan kaj agrablan vesperon.

L. Kynčl

ooo-ooo-ooo

COLLEGIUM DI FLAUTI koncertis por ni ...

En edifajn programojn en nia EK ni devas vicigi la vesperon 20.1.1975, dum kiu la muzik-ensemblo Collegium di flauti prezentis al nia klubanaro koncerton el la komponaĵoj de Haendel, A. Corelli, L. Sluka, J. Hubert, A. Parsch kaj M. Štědron.

Prof. Václav Žilka ludis je fluto, prof. Jar. Fantyš je gitaro, prof. dr-o P. Sádlo-Páv je violonĉelo kaj Jana Petzová je fluto.

La programerojn anoncis kaj du esp.-lingvajn rakontadojn enmetis P. Sádlo (l. Kiel mi fariĝis esperantisto, 2. Travivaĵoj el la "VerdaaĈaro").

La vespero estis unu el pluraj aranĝoj de la muzikensemblo, plenumataj por honorigi la kvindekjariĝon de nia ŝatata membro Dr-o Pravoslav Sádlo, eminenta aktoro de la glormemora teatra grupo de nia klubo, La Verda Ĉaro de Julio Baghy.

(Mařík)

Jaroslav Mařík SAGACAJ MANIPULANTOJ

La propagandanto de la lingvoprgjekto "Interlingua" de IALA s-ro Tomik, instruisto en Slovakio, daŭre misuzas la nomon de prof. D-ro E.Bokarev favore al Interlingua, trompe asertante, ke Bokarev, la elstara laboranto de la sovetia lingvoscienco, estis kontraŭ Esperanto kaj por Interlingua, Kiel atentigis nin s-anino M. Josková, en februara numero de la slovakia gazeto "PAS" refoje aperis tiu aserto de Tomik.

Tia asertado estas ne nur malsincera, sed rekte falsa. Pruvon pri tio alportas interalie detala traktato "Esperanto-verko de Zamenhof" el la plumo de E. Bokarev, aperinta en la lasta numero (6-1974) de gazeto PACO, kie la profesoro argumentas, kial Esperanto estas taŭga kiel internacia lingvo kaj kial ne la ceteraj sistemoj, t.n. naturalismaj, kia estas Interlingua (IALA) aŭ Occidental (de E. von Wahl), alinomita post la dua mondmilito, pro neebleco propagandi ĝin sub tia nomo en la socialismaj landoj, je "Interlingue". La lastan propagandas en nia lando s-ro Stan. Borovka en Hradec Král., konata pro akraj atakoj ĉe iu ajn institucio en nia lando, kiu montris intereson pri apliko de Esperanto.

Instrua por ni kaj ankaŭ por s-ro Tomik estas klarigo de reprezentantoj de Interlingua en la 89a kongreso de Modern-lingva Asocio de Usono (New York, 26.-29.12.1974), kiel evidentiĝas en la raporto de profesoro E.E.Wood en Heroldo de Esperanto n-ro 3/1975. Ni citas:

"La kunvenon de "Interlingvistiko" prezidis Prof. D-ro Julius Balbin: la elektita temo estis "Interlingua kaj parolantaro de Esperanto". La du-tri reprezentantoj de Interlingua klarigis, ke temas pri p a s i v a lingvoprojekto por sciencaj kaj legaj celoj, dum ili agnoskis, ke Esperanto havas socian bazon kaj realan paroleblecon."

Tiu ĉi kongreso de profesoroj kaj instruistoj de modernaj lingvoj en Usono traktis en kelkaj sekcioj ankaŭ pri Esperanto kaj okupis sin i.a. pri la temo: "Kiujn verkojn devus enhavi Esperantlingva antologio de la usona literaturo de la 20-a jarcento."

Kiel Tomik en Interlingua, tiel occidentalistoj en Interlingue (Occidental), en la gazeto "Žár Vysočiny", n-ro 21 de 18.11.1955, Žďár. n.Sáz., la signo "-on-" (evidente Vondráček) facilanime argumentante kontraŭ Esperanto kaj misinformante pri "rifuzo al Esperanto ĉe la antaŭnelonga balotado de UNESCO en Montevideo" li triumfete konstatas, ke la interlingue-anoj povas fieri pri letero veninta al ili de la vicprezidanto de la moskva lingva instituto kaj membro de la Akademio de Sciencoj de USSR k-do Bokarev, skribita en Interlingue!

Jes, kiu havis okazon diskuti kun Bokarev, scias, ke li, interesiĝanto pri la problemo de IL, studis plurajn projektojn kaj kolektadis studmaterialojn pri ili por la celoj de scicnca komparado. Kaj la artikol-aŭtoro do jam sugestias al la legantoj la occidental-emon de Bokarev.

Estus tre dezirinde, ke kaj Tomik kaj Vondráček kaj Borovka kunatiĝu kun la finaj konkludoj kaj sciencaj argumentoj en la citita traktato de Bokarev, membro de la Akademio de Esperanto, kaj ĉesigu la malveraĵojn pri la soveta lingvosciencisto!

Same malica estas la akcentado de la occidentalistoj (interlingue-anoj) pri soveta civitaneco de la aŭtoro de "Occidental, Edgar von Wahl, baltgermana nobelo, kiu ja estis cara oficiro, poste estonia ŝtatano kaj sen propra merito fariĝinta sovetiano post la aliĝo de Estonio inter la sovetajn respublikojn, se ni rememoras (citita el la "Historio de la mondolingvo" de E. Drezen, aperinta ruslingve en USSR en kvar eldonoj), ke la occidentalistoj klopodas starigi sian sistemon kontraŭ Esperanton, kiel, laŭdire, lingvon de orienteŭropaj barbaroj kaj bolŝevistoj."

-oo-oo-oo-

C i t u j e m e .....

- z plánu činnosti Českého esperantského svazu na rok 1975:

  čl.II/1 - Na úseku kulturně politická činnosti

  - prostřednictvím svazového tiskového orgánu "STARTO" a "Informací" systematický ovlivňovat a instruovat členy a funkcionáře ČES, jak se účinně zapojit do příprav 30. výročí osvobození ČSSR Sovětskou armádou. Seznamovat mládež s podílem esperantistů v boji proti fašismu, s persekucí těchto odbojových pracovníků v době okupace, se zapojením esperaritistů do budování socialistického státu, s významem socialistického vlastenectví a internacionalismu.

  Organisačně i obsahově pomoci připravit "Setkání českých i slovenských esperantistů na pomezí" na počest 30.výročí osvobození ČSSR.

  - Prohloubit spolupráci a Městskými, Okresními či Krajskými mírovými radami prostřednictvím důvěrníků MEM. Využít našeho zastoupení v České mírové radě k obdobnému zastoupení v okresních orgánech.

  - Rozpračovat v konkrétní opatření úkoly sekce MEM.

  - Připravit jednu lekci /i rozmnožení/ pro politicko-výchovné školení našich kurzů, zejména pak v Lančově.

  - Uspořádat během roku 1975 internátní 2-3 denní školení funkcionářů o kulturně výchovné činnosti v socialistickém státě.

- z článku o esperantu, otištěného 19.11.1974 v oblastních stranických novinách "Ivanovská universita" /přel. Chi/ :

  "V mnohých městech SSSR je možno potkat lidi se zeleným odznakem, na kterém je písmeno E. Jsou to esperantisté. Esperanto je umělý jazyk, krásný, libozvučný, v kterém je možno vyjádřit každou myšlenku. O tom jsme se přesvedčili, když jsme byli na letním sjezdu esperantistů, který se konal v našem okrese pod Kinešmoj. Na sjezd přijeli zástupci 14 národností, z 8 sovětských republik. Za 10 dní, prožitých v táboře, jsme se naučili hodně nového v jazyku, získali praktické vědomosti, dokonce jsme skládali i zkoušku. A kromě toho jsme si hezky odpočinuli. Večer u táboráku zněly písně přeložené do esperanta ze všech jazyků světa. Těžko nám bylo se loučit, i když jsme věděli, že se zase sejdeme.

(z korespondence Esperantského kroužku při ZDŠ Praha 8 Lindnerova ul., se SSSR)

En la nuna numero ni malfermas la regulan rubrikon laŭ kontribuoj de nia membro s-ano J.Tomčík, nomitan

ELSTARAJ PERSONOJ PRI LA IDEO DE INTERNACIA LINGVO.

Jan Amos K o m e n s k ý - (1592-1670), ĉeĥa filozofo, scienculo kaj pedagogo.

"Ĉar ni fine trovis, ke en la penetrado kun ĉi tiu lumo al la nacioj estas unusola, sed potencega obstaklo la multeco, diverseco kaj konfuzo de la lingvoj, ni kuraĝis klopodi pri forigo de ĉi tiu obstaklo per novaj konsiloj pri pli bona kulturado de ĉiuj lingvoj, pri la simpligo de la multlingveco, kaj fine pri la kreo de unu tute nova lingvo, tute facila kaj tute racia kaj filozofia (eĉ pansofia!), kiel universala rimedo de la lumo."

(Dediĉo de la libro "Via lucis" al la Reĝa Londona Societo, par. 9)/

"... Ni opinias, ke unu komuna lingvo estas por la mondo bezonata, kaj se alia ne ekzistus,

pli konvenus por tiu ĉi bezono destini la latinan ol kiu ajn alian. Sed ĉar niaj pensoj pli alten direktiĝas, ni ne povas ne konsili pli volonte lingvon tute novan."

"Restas do neniu pli efika kuracilo, ol ke aperu lingvo nova, ol ĉiuj jam konataj: 1. pli facila, kiun sen perdo de tempo kaj esenco de aferoj oni povus lerni; 2. pli agrabla, por ke oni povu lerni ĝin kun ĝuoj. 3. pli perfekta, ... tiel, ke ĝi helpu kompreni la sencon de aferoj."
("Via lucis", Praha: Ŝtata pedag.eldonejo, 1961, eldonita laŭ la unua latina eldono en Amsterdamo, 1668. Latina teksto p. 258, 260).

René D e s c a r t e s (Kartezio) - (1596 – 1650), franca filozofo kaj matematikisto.

"Arta lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi sciencon, formulantan ĝiajn principojn. Helpe de tiu ĉi lingvo kamparano juĝos pri la senco de la aferoj pli facile, ol tion nun faras filozofoj."
("Harmonie universelle", Paris,1636-1637)

"Estas multaj personoj, kiuj volonte oferus kvin aŭ ses tagojn da tempo por povi komprenigi sin al ĉiuj homoj... Mi kuraĝas esperi, poste, universalan lingvon tre facilan por ellerni, por prononci kaj por skribi, kaj kiu, kio estas la cefa afero, helpus al la racio, prezentante al ĝi ĉiujn aferojn tiel distinge, ke por ĝi (nome por la racio) estus preskaŭ maleble erari..."
(El la letero al Perre Marsenne de la 20-a de novembro 1629)

(Laŭ L.Dratwer: Internacia lingvo dum jarcentoj. Eld. CEL) (daŭrigota en ven. num.)
J.T.

N i i n f o r m a s ...

- Laŭ nia informiĝo ni povos jam komence de aprilo denove kunvenadi en nia ejo je la 19-a horo. Preciza dato estos anoncita dum iu el venontaj kunvenoj.

ĜENERALA KUNVENO de EKP okazos lunde la 7-an de aprilo 1975 je la 20-a horo en la kunvenejo "U Bumbrlíčka" Praha 1, Vodičkova 6.
La ĉeesto de ĉiuj membroj estas dezirinda. La ĉefaj punktoj de la programo estas agad-raporto pri la pasinta jaro kaj elekto de la komitatanoj por la venonta agad-periodo.

- Modela E-leciono en Praha-Libeň. Klubo de internacia amikeco ĉe ZDŠ Praha 8, Lindnerova str., okazigis modelan instru-horon de Esperanto-rondeto sub la gvidado de s-ino Eli Urbanová, lunde la 17-an de februaro 1975 posttagmeze, kun programo. Rolis infanoj de la 2-a ĝis la 8-a klaso de ZDŠ. Ĉeestis gepatroj de la infanoj kaj kelkaj niaj klubanoj. Evidentiĝas, ke tiuj aranĝoj havas plenan sukceson.

- Pravoslav Sádlo-Páv 50-jara ???

Kiu el nia klubo konas nian membron, eminentan parolanton en Esperanto, d-ron Pravoslav Sádlo, certe estas surprizita sciiĝi, ke li, karakterizata de ĉiama juneca, aspekto, fariĝis la 6-an de februaro 1975 kvindekvinjara!
Kvankam origine doktoro pri la jurosciencoj, li realigis sian delongan revon dediĉi sin sole al la muziko, li fariĝis muzikdirektisto kaj nun funkcias en la Konservatorio de Praha. Esperantisto li fariĝis estinte inspirita de E-lernolibro, antaŭ multaj jaroj hazarde trovita en la biblioteko de sia patro (fama) muzik-pedagogo kaj direktoro de la Ĉeĥa filharmonio.
Ni rememoras nian doktoron precipe kiel sukcesplenan aktoron de nia "Verda Ĉaro de J.Baghy" (ekz. prof. Higgins en "Pigmaliono’" de Shaw, veziro en "legendo pri amo" de N. Hikmet, Vávra en "Maryša" de fratoj Mrštik k.a.) kaj ankaŭ pro artoĝuoj, kiujn li donis al ni per siaj koncertoj

en la klubo. (J.M.)

- La tombo-monumento de J. Baghy. Kompletigante la informon en la 14-a numero (1968) ni sciiĝas, ke la inaŭguro de la tombo-monumento, en la Nacia Panteono de Budapeŝto, de nia granda poeto Julio Baghy (kiu mortis la 18-an de marto 1967) okazis la 14-an de julio 1974. Sur la monumento troviĝas mallonga, sed trafa epiteto "Paĉjo. La homa homo." (El Hero1do de Esperanto).

- Esperantista ambasadoro ĉe U.N. La nuna aŭstralia ambasadoro ĉe la Fed. resp. Germanio, Ralph Harry, fariĝos ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Li foriris el Bonn komence de februaro 1975 kaj alvenos en Nov-Jorkon (post vizito en Aŭstralio) antaŭ la fino de marto. (El Heroldo de Esperanto).

- Eminenta intereso pri Espo. 15.000 informpetojn pri Esperanto ricevis en la jaro 1973 la pola Esperanto-asocio, kiu havas 10 salajratajn oficistojn kaj 6 konstantajn laborantojn. La IV-a eldono de la konversacia broŝuro "Ĉu vi parolas Esperante?" aperis en la kvanto de 20.000 ekz. En la sama kvanto aperis ankaŭ esperantlingva konversacia manlibro por turistoj.
(laŭ "Esperantisto slovaka")

- Komuna flugo de "Sojuz" kaj "Apollo". La 25-a Internacia astronaŭtika kongreso" en Amsterdamo okupiĝas ĉefe pri komuna flugo de la soveta kosmoŝipo "Sojuz" kaj la amerika "Apollo" okazonta nunjare. Kaj la amerikaj kaj la sovetaj kosmonaŭtoj substrekis tie, ke la ĉefa problemo estas - la lingvo!
(El K.k.K. Zagreb)

- "Nia plua okdekjarulino" - La 11-an de marto 1975 festis sian 80-an naskiĝdatrevenon s-ino Aŝa H e j n o v á , membrino de EKP, longjara amikino kaj kunlaborintino de Julie Šupichová.
Ni ĉiuj kore gratulas dezirante al ŝi ankoraŭ multajn jarojn en ŝia meritplena poresperanta vivo, dediĉata ĉefe al tradukado de verkoj.

N i l e g i s en "Pacaktivulo" (n-ro 101/75, Sofio)

"Tutan jaron sen Tomáš Balda!" Sub tiu titolo oni rememoras la unuan datrevenon de la morto de tiu ĉi estinta membro kaj funkciulo de nia klubo kaj sekretario de MEM. "Ni denove rememoras, ke ni perdis saĝan, kompetentan kaj simpatian kunlaboranton, kiu ludis gravan rolon ĉe la kapo de nia movado.
Homoj, kia vi, kara pacamiko, honoras kaj sian landon, kaj nian movadon kaj la homaron." (La redakcio de PA)

En la sama numero aperis interesa statistiko pri la 20 jaroj de la gazeto "Paco", organo de MEM: ekde ĝia naskiĝo en 1953 ĝis la fino de 1973 aperis entute 178 kajeroj, entenantaj sume 3.248 paĝojn. 20 landoj partoprenis la eldonadon. "Oni notu, ke Ĉeĥoslovakio nekontesteble okupas la unuan lokon kun eldono de 35 kajeroj (701 p.)," konstatas Pacaktivulo. Sekvas Bulgario, Hungario, Japannio, Vjetnamio, Germana Demokratia Respubliko, Francio, Islando ktp. /jm/

ooo---ooo
ooo

F o r p a s i s ...

la 21-an de januaro 1975 mortis en Poděbrady nia estinta membrino kaj longjara vizitantino de nia klubo Anna Musilová.

KORESPONDI DEZIRAS
Pasia filatelisto ŝatus korespondi kun okcidentaj landoj.
La adreso: Tomáš H o k ů v , Esperanto-rondeto ZDŠ-Lindnerova str., Praha 8-Libcň, Ĉeĥoslovakio.

N i a l v o k a s . . . . .

- Por pli inda lokigo de nia kluba biblioteko ni havas la eblecon akiri pli vastan ĉambron en Praha 1, kiu ĝis nun estis uzata kiel garaĝo, sub la kondiĉo, ke ni sukcesos trovi por la ĝisnuna uzanto aŭ pretan garaĝon (se eble masonitan) por granda persona aŭtomobilo aŭ grundon, kie eblas starigi ladan garaĝon. Sed la objekto estu nur en la urbopartoj Praha 1, 2, 3 kaj 7.
  La estraro de EKP tre petas ĉiujn membrojn, ke ili helpu en tiu ĉi urĝa tasko, solvenda en plej proksimaj semajnoj!

- Kiel ĉiujare en julio kaj aŭgusto estos nia regula kunvenejo "U Bumbrlíčka" ankaŭ ĉisomere fermita. La gesamideanoj estas petataj kunlabori en serĉado por trovi taŭgan kunvenejon por tiuj du monatoj en la urbocentro.

- La Esperantista klubo en Praha aranĝas ekskurson al "Renkontigo de Esperantistoj en Plzeň", okazonta la 23-an - 25-an de majo 1975. Oni intencas tiucele prizorgi por la ĉefa tago de la Renkontiĝo, t.e. por sabato la 24-an, propran aŭtobuson. La interesantoj bonvolu sin anonci ĉe s-ino Anna Bárochová je la telefono 2238297 !

-o-o-o-o-
o-o-o

Láďa Kynčl: La surpriza renkontiĝo

Ĉiu konvinkita esperantisto, kiu praktike uzis sian internacian lingvon por kontaktoj korespondaj aŭ por personaj renkontiĝoj aŭ celoj komercaj aŭ por diversaj gravaj kaj amuzaj interesoj, baldaŭ kaptas la ideon vastigi tiun ĉi bonan rimedon inter la aliaj homoj.

Des pli la juna homo uzas sian iniciatemon baldaŭ post la fundamentaj lingvaj scioj. Kaj ĝuste tiel faris mi, dum militservo, kiam mi sukcesis gajni du amikojn por Esperanto. Kiel soldatoj ni disiris, promesante unu al la alia skribe kontakti. Sed post la reveno hejmen atendis nin ĉiutagaj devoj kaj nia korespondado iom post iom ekdormetis kaj la milito estis la kaŭzo de la fino de nia korospondado. Nur rare mi rememoradis ambaŭ miajn amikojn, kun kiuj mi vivis 18 monatojn en amika kunesto.

Baldaŭ post la milito, en libera ŝtato, mi revenis al Esperanto, vizitante preskaŭ ĉiujn renkontiĝojn, ekde la Someraj universitatoj en Doksy. Kongresoj de nia E-asocio ĝis renkontiĝoj kun eksterlandanoj kaj mi ĝojis pro ĉiu kresko de nia movado.

En la decembro pasintjara mi vizitis tradician Nikolao-vesperon en Jablonec n/N, kaj tuj ĉe la enirejo de bela salono aperis antaŭ mi Esperantisto, kies vizaĝtrajtoj ŝajnis al mi konataj. Kvankam mi klopodis diveni, de kie mi konas lin, mia meditado ne atingis sukceson. Sed la apudstaranto, vidante mian embarason, faris unu paŝon antaŭen kaj elpoŝigis malgrandan libreton kun granda glumarko, ornamita per bela rozo, kaj momenton atendis, observante min.

La broŝuro estis la "BES-adresaro" al mi konata. La glumarko sur ĝi indikis jaron de eldono kaj sur la foto al mi aperis mia amiko de antaŭ kvardek jaroj. Eble tro laŭte mi salutis lin, ĉar la ĉirkaŭstarantaj homoj komcncis nin observi.

Nun restas al mi nur la demando, ĉu ankaŭ la alia amiko portas malkaŝe la insignon Verda Stelo kaj ĉu li post kvardek jaroj fidele celas la vojon signitan de nia majstro L.L.Zamenhof.

-o-o-o-o-

E l n i a k l u b a v i v o (daŭrigo.)

Nia antaŭa raporto resumis la periodon de la 13-a de februaro ĝis la 3-a de septembro 1974, en kiu okazis 28 kunvenoj, kiujn ĉeestis 822 klubanoj plus 82 gastoj el ĈSSR kaj el 14 fremdaj landoj. La meznombra ĉeesto de membroj estis 29 en 1 kunveno.

La respektiva j nombroj por la plua periodo estas:

| | kunvenoj | membroj | gastoj | el kiom da fr.landoj |
|---|---|---|---|---|
| 10.9.-31.12.1974 : | 14 | 504 | 64 | 5 |
| 1.1.-3. 3.1975: | 9 | 266 | 21 | 2 |
| s u m e | 23 | 770 | 85 | 7 |

Ni notu, ke 3 kunvenoj ne okazis pro fostotagoj. La mezalta ĉeesto de la membroj en 1 kunveno estis 33,4 (do alkresko je 4,4 membroj). La gastoj estis plejparte el Praha, el Kolín 3x, Radotín 3x, Kladno 3x, Příbram lx, Roudnice n./L. lx. El fremdaj landoj: GDR 6 personoj, Bulgario 6, Hispanio 3, Aŭstrio 1, F.R.G. 1, Hungario 1, Svedlando 1. La sumo de la membroj kaj gastoj (kiuj forgesis subskribi sin.!): 855 en 23 kunvenoj (meznombro: 37 personoj). La plej multnombra ĉeestantaro venis 16.12.1974 (Solena Zamenhofa vespero): 65 /55 membroj kaj 10 gastoj).

La unuajn kunvenojn (10.9. kaj 17.9.) ni havis ankoraŭ en la restoracio "U Šumavy", kaj de la 24-a de septembro, post la finita adaptado, ni kunvenadis denove "U Bumbrlíčka" en Vodičkova 6. Ni revenis en ejon kun novaj meblaro kaj lustroj.

La restoraciestro "U Šumavy" redonis al ni kvar originalajn kolorajn bildojn, kiuj kuŝis 20 jarojn en la kelo (de la tempo, ni havis tie normalan kunvenejon). Ili estis nur parto el la kolekto de ĉarme satiraj bildoj el la esperantista vivo, faritaj por nia EK de nia (jam mortinta) membro, kiuj dum proks. unu jaro pendis en la kunvenejo, sed poste malaperis. S-ano Dryák prenis ilin al si por ripari la vitron kaj kadron de unu el ili. Ni esperas, ke la bildoj povos ornami nian bibliotekejon! Domaĝe, teni ilin en kelo!

La 6-an de jan. 1975 ni devis komence sidi kiel normalaj konsumantoj en "Černý pivovar", ĉar intertempe la direkcio de "U Bumbrlíčka" nuligis por nedifinita tempo nian kontrakton pro la kaŭzo, ke "nia ejo" estos vespere okupata dum tiu tempo de alia restoracio pro adaptado en ĝiaj ejoj. Sed el Č.P. ni ankoraŭ samvespere transiris al restoracio "U Bumbrlíčka" kaj de tiam ni tie kunvenadas, post renovigo de nia kontrakto, sed nur de la 20-a horo. Espereble, ke dum marto, aŭ proksimume aprilo, kiam la adaptado finiĝos, ni povos donove kunvenadi, tie je la 19-a horo.

Kelkvorte pri la enhavo de la kunvenoj:

<u>10.9.1974</u>: aktualaĵoj. Diskuto pri preparata kurso en ČKD-Kompresory.

<u>17.9.1974</u>: aktualaĵoj. H. Stroinski (GDR): La E-movado en Leipzig.

<u>24.9.1974</u>: aktualaĵoj. Renkontiĝo en Ústí n.L. (Janda el Kolín). Iuj neologismoj en PIV (Slanina), Hispanio en koloraj diapozitivoj (prelego de B. Molera el Barcelono).

<u>7.10.1974</u>: aktualaĵoj. Diskuto.

<u>14.10.1974</u>: I-a kongreso de ĉeĥaj ("bohemaj") esperantistoj en 1909 kaj la (nun tute ne spertata) eĥo en la publika vivo de Praha (D. Bartošík).

<u>21.10.1974</u>: W. Haupt (GDR): lumbildparolado pri esp. libertempoj kaj vojaĝoj (Miedzigorze, Plovdiv, Pamporovo, Rumanio, Praha, GDR)

<u>4.11.1974</u>: D-ro R. Horský: Du gloraj datrevenoj de la Ĉeĥa reformacio – Milíč z Kroměříže kaj Jan Žižka (600j., 550 j.). Diskuto kaj aktualaĵoj.

11.11.1974: M.Juřenová: Granda Oktobra Revolucio kaj la 1-a datreveno de la Kongreso de Pacamaj Portoj, Moskvo 1973.
Jar. Šperling: Esperantistaj renkontiĝoj en Mělník 1969-74 (propra filmo).
18.11.1974: aktualaĵoj.
J. Bendová: Rememoro pri la forpaso do J.A.Komenský - universalaj celoj de la homaro (laŭ liaj verkoj)
25.11.1974: Libera tribuno.
J. Laube el Roudnice, sekr. de Teknika sekcio de ĈEA: Laboro de la Teknika sekcio.
T. Pavlíček: Humoraĵo (k.a.)
2.12.1974: J.Mařík: 60 jaroj de R.Horský. Brita ministro de kulturo en UK Hamburgo.
A.Bárochová: Informace ČES, n-ro 25, k.a.
9.12.1974: Kynčl: Pri renkontiĝo en Jablonec n.N. kaj
Křenková: Renkontiĝo en Ostrov n.O.
L.Kynčl (prelego): La kreskaĵoj kaj la moderna vivo.
16.12.1974: Solena vespero Zamenhofa kaj porpaca.
23.12. kaj 30.12.1974: la kunvenoj ne okazis (festotagoj)
28.12.1974: same.
6.1.1975: aktualaĵoj. Libera tribuno.
13.1.1975: A. Hejnová: D-ro Alberto Schweitzer – la kuracisto en afrika praarbaro (115-a naskiĝdatreveno). (Rimarko de red.: A. Hejnová tradukis tutan ĉeĥan monografion pri Alberto Schweitzer!)
Informoj.
20.11975: Koncerto de Collegium di flauti en EKP (vidu aliloke).
27.1.1975: informaro (Kynčl, Dryák, Mařík). Láďa Kynčl legis specimenojn el "Tridek jarojn en la Oro Nordo" (Welzl) kaj "Mi en li" (Vladyka).
A. Bárochová konigis la enhavon de Bultono de EK Brno.
3.2.1975: Pavlíček: la malplena skatolo (aŭ Floroj por la "Führer")
-streĉa (rakonto el lia vivo dum la nazia okupacio).
J. Mařík: Revuo de novaĵoj
A. Bárochová: " Infomace ČES", n-ro 26/75.
K o m i t a t a k u n v e n o (organizaj aferoj, la junulara problemo en nia EK k.t.p.)
10.2.1975: Diversaĵoj: E.Urbanová (pri specimena leciono de Espo en nia lerneja rondeto, kiun vizitis č.10 klubanoj)
L.Kynčl: Sportista marŝo tra Brdy kaj logado el la "Sherlock Holmes en la servo de la hispana trono."
24.2.1975: Alparolo kaj rakontado pri vojaĝoj k.s, de H. Schindler (FRG).
Diskuto: Slanina, Josková.
J. Mařík: Interlingua, Interlingue (Occidental) kaj misuzado de la nomo de A.Bokarev fare de interlinguano Tomik
(trafan respondon donas "PACO" n-ro 6/1974!)
24.2.1975: B. Dryák: 27-a datreveno de la Februara Venko
M. Josková: prologo pri Interhelpo (50-jara jubileo)
- verkis s-ano Bárta el Žilina.
Aktualaĵoj (Kynčl, Mařík, Urbanová, Bárochová, Šustrová).
3.3.1975: D. Bartošík: Rakontado pri trimonata restado en Nederlando kaj pri tipa movado.
Poste li rememoris la 91-an naskiĝ-datrevenon de H. K. Bouška, unu el la gravaj pioniroj.
Diversaĵoj (Kynčl, Tomčík).
Komitata kunveno (la ĉefa temo: la junularo).

21. kunvenojn gvidis L.Kynčl, la ceterajn D-ro Nývlt, Bartošík kaj Mařík.

Krom la enkluba agado la komitato aranĝis unu aŭtobusan karavanon, dimanĉe la 20-an de okt.1974 al la tradicia esp.renkontiĝo en Mělník.

J. Mařík.

-o-o-o-o-o-

P r o g r a m i t a j   v e s p e r o j  en EKP – II-a kvaronjaro 1975:

21.4.1975: Vyhlas-Kynčl: La ekskurso en Sudokcidenton (per diapozit.)
28.4.1975: Anči Bárochová: Miaj kongresaj rememoroj
19.5.1975: A.Slanina: Ĉu ni komprenas la vestadon?
26.5.1975: Eli Urbanová: Edukado al la scienca opinio
Prelegaj kontribuaĵoj por la pluaj vesperoj estos bonvene akceptataj.

P o k l a d n í   z p r á v a :

Velmi nás potěšilo, že většina našich členů splnila svou povinnost zaplacením členských příspěvků na nok 1975 a tak do konce r. 1974 jsme mohli Svazu již odevzdat členské příspěvky za 172 členů našeho klubu. Tito podpořili klub po finanční stránce 10% odměnou, kterou jsme takto od Svazu získali. Od dalších členů jsme dostali jejich členské příspěvky v tomto roce, takže za rok 1975 máme do dnešního dne (1.2.1975) zaregistrovaných 218 členů klubu i Svazu, Zbývá již jen menší počet členů, kteří ještě za rok 1975 nezaplatili, ale doufáme, že tak učiní během roku, aby mohli pravidelně dostávat naše BULTENO i STARTO.

Děkujeme proto všem těmto členům i dárcům na tiskový fond, kteří se jistě řídili heslem "Kdo rychle dává, dvakrát dává."

Mrzí nás, bohužel, že mnozí členové, platící své členské příspěvky do r. 1973, stále zůstávají dlužni a naši výzvu, aby event. vrátili upomínku s poznámkou "Nepřijímám", nechali bez povšimnutí. Tím nám jen ztěžují naši snahu mít pořádek v naší členské kartotéce.

Anna Bárochová
pokladní EKP

Členské příspěvky na rok 1975 zůstávají nezměněny:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kategorie | A/ výdělečně činní a důchodci s příjmem 1000 KČs a více platí | | Kčs 68,- |
| | B/ důchodci s příjmem pod 1000 Kčs, | | " 44,- |
| | studujíeí a učni | | " 34,- |
| | C/ podporující členové Svazu | nejméně | " 120,- |
| | D/ rodinní příslušníci bez nároku na "Starto" | | " 20,- |
| | E/ přispívající členové | | " 30,- |

Nově se hlásící členové platí Kčs 10,- navíc jako jednorázové zápisné na legitimaci Svazu. Podotýkáme, že každý člen klubu musí být i členem Svazu! V členském příspěvku kategorií A,B,C je automaticky zahrnuto předplatné na svazový časopis "Starto".

Další dary na tiskový fond EKP, většinou došlé při placení členských příspěvků na rok 1975 a od některých našich příznivců:
Kčs 150, - arĥ. Josef Drlík, Praha, Kčs 56, - Krista Vlčková, Praha, Kčs 32, - Karel Zahradník, Marie Nováková, Marie Cojnárová, Prof. Ing. Josef Kochman, Jaromír Vrkoslav, Ing. Josef Trojan, Marta Křenková, Luboš Šanda, Věra Skalová, Růžena Reneltová, manželé Damaškovi, všichni z Prahy, Olga Ungerová, Neratovice, Magda Peleová, Červený Kostelec, 30,- Kčs Marie Cvalinová, Praha, Závodní klub ROH-EK, Příbram, 26, -Kčs Marie Hastermanová, Praha, 25, -Kčs Karel Grund, Klánovice, 22, -Kčs Marie Baldová, Řevnice, Ludmila Hromádková, Katovice, 20,- Kčs Stanislav Werner, Těchonín, Anna Grauerová, Krnov, M.Světlíková, Praha, 17,- Kčs Josef Halda, manž.Nývltovi, Oto Jerie, všichni z Prahy, Karel Zipser za EK Stonava, 10,- Kčs Vlastimil

Blažek za EK Olomouc, 8,- Kčs Frant. Brandejs, Praha, 7,- Kčs Krista Budková, Praha, 6,- Kčs Anna Bursová, Milena Skoková, Marie Neznalová, Václav Rubeš, Petr Tichota, Josef Havel, Marie Šiková, Málka Smítková, Bedřiška Řeháčková z Prahy.

A.B.

-o-o-o-o-o-o-

A F O R I S M O J :

Pri modesteco oni ne krias.
Ankaŭ flustre oni povas krii.
Multaj virinoj similas al libroj. Ili havas nur belan pakumon.

Ŝ E R C O J :

Sciu, amiko, vespere mi plej volonte eltiras el la libroŝranko RUR-on!
Jes, mi ankaŭ eltiras - sed el la telerŝranko RUM-on.

Kelnero, mi esperas, ke vian restoracion vizitas nur decaj homoj!
Jes, sed Vi nur trankvile restu!

Kara sinjorino, ŝajnas, ke estiĝis eraro. Vi gazetanoncis, ke vi estas "juna vidvino", sed vi havas certe sesdek jarojn!
Ĝi ne estas eraro, mi ja estas vidvino ne pli ol du semajnojn!!!

---

BULTENO de EKP (loka grupo de ĈEA), pk 1069, Praha 1
redaktas: D-ro Miloš Nývlt, Jaroslav Mařík, Václav Lorenz.